Estis kongreso alia ol ordinara. Estis precipe ĝojige, ke ĝi kolektis same multe da partoprenantoj kiel, ekzemple, la stokholma kongreso, kaj ke multaj partoprenantoj estis junaj. Infana kongreseto tamen ne povis okazi pro manko de aliĝoj.

La ĉefa impresado de la kongreso estas, ke LKK multe laboris por fari bonkvalitajn programojn kaj havi bonajn kontaktojn kun la urbaj kaj ŝtataj aŭtoritatoj kaj kun diversspecaj amaskomunikiloj. Tiuj partoj estis, laŭ mi, sukcesaj. Sed la organiza parto de la kongreso ne ĉiam estis same bona, tiel ke oni devis uzi multe da tempo nur atendante, kelkfoje vane. Tio kaŭzis problemojn kaj malkontenton.

Sed ĉiuj funkciuloj estis ĉiam afablaj kaj helpemaj kaj faris, laŭ mia sperto, sian plej bonon por kontentigi nin. Kaj la suno verŝis sian oron sur nin la tutan semajnon kaj faris ankaŭ nin eŭropanojn toleremajn kaj bonhumorajn.


Kiel kutime mi deziris esti en du, tri aŭ eĉ kvar lokoj samtempe por sekvi la diskutojn, sed kiel kutime mi devis elekti inter ili.

La plej gravaj diskutoj okazis en la komitataj kunsidoj. Ĉijare estis pli grave ol kutime ĉeesti, ĉar kelkfoje estis malfacile havi

kvorumon, kiu estas necesa por ke la komitato estu decidorajta. Komence ŝajnis, ke la komitato ne povos labori, ĉar la direktoro de la centra oficejo de UEA raportis, ke pluraj landaj asocioj ne pagis sian membrokotizon. Estis tiel rimarkinde multaj, ke oni devis fondi specialan komisionon por esplori la unuopajn kazojn. Sabate tamen ĉiuj komitatanoj rajtis partopreni plene. Mi iom timis, ke ankaŭ Svedio estos menciita inter la nepagintaj asocioj, kiam Stefan MacGill ekmenciis Aŭstrion, Brition, Ĉilion, Islandon, Italion, Nederlando, Svislando ... Sed kun

batanta koro mi konstatis, ke Anita prizorgis la pagon. La kaŭzo de tiu amasaj nepagoj estis, ke UEA tro malfrue elsendis cirkuleron al la landaj asocioj, en kiu ĝi enketis pri la nombro de asociaj membroj. Eble UEA iom eraris, sed la landaj asocioj ja tamen scias, ke la membrokotizoj devas esti pagataj, se iliaj reprezentantoj rajtu partopreni la kunsidojn.

Estis entute 38 punktoj sur la tagordo de la komitato. La plej multajn oni rapide aprobis, preskaŭ sen diskuto. Aliaj kaŭzis sufiĉe longajn debatojn. Unu punkto temis pri la jaro 1987: la jaro de la internacia lingvo. Tonkin estis proponanto aŭ raportanto de la komisiono, kiu faris la planon, kiu temas pri la jaroj 1983 — 1987. Temas pri granda laboro de la tuta esperantistaro en diversspecaj sociaj tavoloj por grandskale informi pri esperanto. Pri tio ni povos





certe legi pli en "Esperanto kaj alie.

Mi ankaŭ partoprenis diversajn komisionajn kunsidojn, ekzemple pri landa agado, pri informado, pri edukado kaj, kompreneble, pri virina agado. La virinoj fakte faris skandalon en Brasilia. Ni decidis, ke en la grupdiskutoj ni provu havi nur virinojn por helpi al iom timemaj virinoj paroli kaj partopreni la diskutojn. Eble Loes Demmendaal, kiu sola devis "elrajdi" la ŝtormon de la podio, ne sufiĉe bone klarigis la celon de la debato. En iu antaŭa komisiona kunsido ni ankaŭ decidis la temon de la debato: "La familio en la moderna socio". Ni elektis ĝin, ĉar ni kredis, ke tio estas temo, pri kiu plej multaj havas sperton.

En la unua ĝenerala virina kunveno ni havis enkonduke prelegon pri parolarto. Ĝin donis William Auld en bonega maniero. Poste Loes klarigis, ke ni formu grupojn kaj diskutu pri la menciita temo por poste raportu pri la diskutoj komune. Kaj tiam ŝi (afable!) petis la virojn ne ĉeesti!! Nun venis la ŝtormo! Oni parolis pri la diskriminacio de la viroj, pri diktatoraj decidoj ktp. Oni ne volis esti en grupoj, volis diskuti tute aliajn temojn kaj, kaj ... Multaj foriris, bedaŭrinde, sed tiuj, kiuj restis, formis grupojn. Almenaŭ en mia grupo la interparoloj estis tre interesaj kaj precipe la brazilaj virinoj donis al ni informojn, kiujn ili certe ne havus okazon doni en granda grupo, ĉefe pro ne sufiĉaj lingvokonoj.

La dua ĝenerala kunsido estis pli kvieti kaj nun Loes havis helpon de Eliza Kehlet, kiu klarigis la celon de la laboro de la komisiono pri virina agado. La diskuto temis pri la agadpunktoj de la komisiono.

Estus multaj eroj, kiujn indus mencii, sed la raporto jam fariĝis tro detalema. Laŭ mi estis granda kaj grava kongreso, kiu signifis multon por montri la universalecon de esperanto. Venis multe pli da eŭropanoj ol kredis la brazilanoj kaj multe pli da sudamerikanoj ol kredis la eŭropanoj. Nun ŝajne esperanto estas same rekonata en Sudameriko kiel en Eŭropo, kaj tio estas granda paŝo antaŭen.

Märtha Andréasson

## Unu el multaj: tiu de la medicinistoj

Dum la 66a UK de esperanto en Brasilia okazis inter alie kunsido de UMEA, do de la medicinistoj-esperantistoj. Ĝi iom diferencis de la kutimaj tiaj kunsidoj. La sekretario de UMEA, dro Imre Ferenczy, salutis nin per malĝoĝiga sciigo, ke dr Shinoda, la prezidanto, malsaniĝis survoje al Brazilo kaj estis enhospitaligita en Lima. Pro tio la kutima, iom soleneca etoso de la kunveno forestis, same kiel la speciala pormedicinista bankedo.

Dum la kunveno oni raportis pri la ĵus okazinta IMEK [Internacia Medicina Esperanta Konferenco] en Ruse, Bulgario. Al la kolektitaj fakuloj estis prezentita kvardeko da sciencaj prelegoj. Tie oni ankaŭ faris kelkajn gravajn decidojn: labori por enkonduko de esperanto en la laboro de MOS [Monda Organizo por Sano], intensigi la kunlaboron kun la Ruĝa Kruco, aperigi lernolibrojn pri medicino en esperanto, uzi esperanton ĉe medicinaj kongresoj kaj konferencoj, enkonduki esperanton

en medicinajn fakultatojn, labori por ke medicinaj revuoj aperigu resumojn en esperanto ktp. Pli detalan raporton pri la tuta IMEK oni promesis sendi al la membroj dum septembro.

La venonta IMEK okazos en julio 1983 en Bratislava, Ĉeĥoslovakio, praktike lokigita por ebligi al la partoprenontoj facilan atingon de la UK en Budapeŝto.

Post tiuj informoj la ĉeestantoj mallonge raportis pri siaj agadoj; oni ankaŭ memoris la forpasintan Janet Enghardt per silenta minuto.

Kiel membroj de UMEA estas bonvenaj ĉiuj, kiuj en sia laboro havas kontakton kun malsanuloj. La membreco inkluzivas abonon al MIR [Medicina Internacia Revuo], kiu aperas per du numeroj po jare, medicinan vortaron ktp. La jarkotizo estas 45 svedaj kronoj kaj oni pagas al iu konto en Japanio. Sed eblas ankaŭ sendi rekte al mi kaj mi plusendos ĝin (Melita Dörr, Arlavägen 11, 703 63 Örebro).

Melita Dörr

## NÄSTAN HEMMA NÄSTA ÅRS KONGRESS

1982 kommer den internationella esperantokongressen att äga rum i Antwerpen, Belgien. Nästan på hemmaplan, efter årets aystånd! Du vill väl vara med! Anmäl dig redan nu. Från januari är avgifterna högre. Gör så här:

Beställ anmälningsblankett från Asta Schaedel, V. Rönneholmsvägen 42 B, 21741 Malmö, telefon 040-91 63 09. Fyll i blanketten och sänd den tillbaka till samma adress.

Betala kongressavgiften till postgiro 14 74 29-5, Sv. Esperantoförbundet, Specialkonto. Du betalar enligt följande tabell:

1 Icke medlem i UEA	451 kr
2 Medlem med årsbok	391 kr
3 Medlem med årsbok och 'esperanto'	300 kr
4 Make/maka till (1)	315 kr
5 Make/maka till (2) eller (3)	274 kr
6 Ungdom t o m 20 år	135 kr
7 Heltidsstuderande t o m 30 år	227 kr
8 Synskadad	180 kr

## Antwerpen



# Ne nur leteroj de plum-amikoj (6)

## PROZO NEFIKCIA


Kompreneble ekzistas granda nefikcia libraro esperanta, kies valoro povas esti granda por iu homa celo, sed kiu ne havas la kvalitojn artismajn, kiujn oni postulas de literatura verko: priskriboj de urboj kaj institucioj, propagandaj, pedagogiaj aŭ porinfanaj verkoj, verkoj pri organizaj aferoj, konsultlibroj, kaj tiel plu. Rigardo al la librolisto de UEA aŭ de alia sufiĉe internacia esperanta librovendejo tuj montros, ke multaj fakuloj povas nun trovi diversajn fakajn informojn pere de esperanto.

Kiel ĉe la naciaj lingvoj, homoj legos inter prozaĵoj nefikciaj kutime nur tiujn librojn, kies fakaj temoj ial interesas ilin. Oni apenaŭ legos *Atakoj kontraŭ ĝardenplantoj* — libron modelan de sia speco, lingve, klarige kaj science — de Paul Neergaard, se oni tute ne havas intereson pri ĝardenplantoj.; la simile modelan *Vivo de Gandhi* de Edmond Privat, se oni sentas nenian intereson pri la problemoj de politiko aŭ la misteroj de la homa animo. Eĉ la leterojn de Zamenhof mem, kortuŝaj dokumentoj pri nobla homo kaj interesaj laŭ stila kaj laŭ historia vidpunkto, oni apenaŭ legos, se oni uzas esperanton nur pro tujaj praktikaj celoj kaj ne sentas ian intereson pri esperantologio kaj la historio de la movado. Kaj eĉ la homo plej larĝkultura kaj legebla ne povas legi ĉion. Mi do volas emfazi, ke jam ekzistas originala faka literaturo en esperanto tre diversa, kun multaj libroj vere fake utilaj. Sed mi aldonas kelkajn rekomendojn pri nefikciaj prozaĵoj, kiuj ŝajnas al mi aparte meritaj kaj interesaj al preskaŭ ĉiuj legantoj.

Ekzistas en esperanto almenaŭ unu elstara verko verŝajne aŭtobiografia, kvankam ĉu temas parte pri fikcio, mi ne scias: *Kredu min, sinjorino!* de Cezaro Rossetti, frato de la poeto kaj novelisto esperanta Reto Rossetti. Ĝi estas kredeble unu el la plej

amuzaj libroj en esperanto, kun stilo malpeza, ofte kun brilaj reprezentadoj de normalaj homaj konversacioj, sed lingve modela. Ĝi brile kaptas la kirliĝadon de la ĉiutaga vivo kaj ĝi spegulas vervan, humuran personecon. Temas pri la simpatia friponeta vivo de profesia vendisto ĉe foiroj, ktp. Ĉarma, varia, ridiga, kelkmomente eĉ kortuŝa, ĝi estas ankaŭ pensiga kaj iom averta.

Grava por tiuj, kiujn interesas poezio, estas la eseo de Gaston



Waringhien pri esperanta metriko en *Parnasa gvidlibro*, sed ni ne forgesu, ke Waringhien estas ankaŭ ĝis nun la plej altnivela kaj multflanka serioza eseisto esperanta. Lia stilo estas elstare klara, sed neniam banala, kaj bele individueca. Li verkas precipe pri literaturo, arto, lingvistiko kaj religio (laŭ vidpunkto liberpenso), kaj liajn eseojn oni trovas en kvin gravaj kolektoj: *Eseoj, Lingvo kaj vivo, Ni kaj ĝi, 1887 kaj ĝia sekvo, Kaj la ceter' ... nur literaturo*. La eseoj de Waringhien kutime montras ne nur viglan intelekton kaj genion por klara instruado, sed larĝan kulturon kaj esloreman erudicion.

Elstare belstila, kaj por ĉiuj legebla, popularscienca verko estas *Vivo de la plantoj* de Paul Neergaard, jam tradukita en plurajn lingvojn. En ĝi klarega kaj detala scienca informado atingas preskaŭ nivelon de proza poemo.

Profesia esploristo kun estiminda verkista talento kaj vivoplena personeco, Tibor Sekelj, verkis amuze, pensige kaj informe pri siaj tre variaj travivaĵoj. Sed li estas poligloto kaj la sola grava esperanta libro lia, kiun li mem originale verkis esperante estas *Nepalo malfermas la pordon*. Pli unueca kaj kortuŝa estas lia *Tempesto super Akonkagvo*, sed H. E. Garotte tradukis tiun libron el hispana originalo, kaj E. Sonnenfeld lian *Tra lando de indianoj* ankaŭ el la hispana. Sed ĉar Sekelj mem reviziis la tradukojn, ili havas iajn ecojn ne nur de lia personeco, sed de lia stilo. Mi jam menciis mian opinion, ke esperanta verkisto, kiu vere atingis altan artan nivelon, estas verŝajne talentulo, kiu kapablas atingi similan nivelon en nacia lingvo. Sekelj estas unu el tiuj esperantaj aŭtoroj, kiu plene pruvis sian kapablon sukcesi kiel profesia verkisto en eĉ kelkaj naciaj lingvoj.

Ankaŭ Ivo Lapenna, kredeble la plej granda oratoro esperanta ĝis nun, kaj estimata fakulo pri internacia juro, verkis sukcese plurlingve pri fakaj temoj: serbokroate, itale, france, angle. Tiu, kiu neniam aŭdis lin oratori, ne plene scias pri lia granda talento: kiel oratoro antaŭ granda publiko li neordinare kunigas altnivelan kulturon kaj altan fakan scion, intelekto konsekvencan enhavon kaj potencan retorikon, kiu foje tre emocias grandajn aŭdantarojn. Lia voĉo, el oro kaj ŝtalo, kaj liaj bele regataj gestoj, ne povas surpaperiĝi. Sed, kvankam oni neeviteble perdas ion, legante en studĉambro, ekzemple, lian *Elektitaj paroladoj kaj prelegoj*, restas enhavo valora kaj tre pensiga, kaj modele klara stilo. Kredeble la plej konata kaj valora verko de Lapenna estas lia *Retoriko*; kiel *La infana raso* de William Auld ĝi estas inter tre malmultaj esperantaj verkoj, kiuj jam aperis en dua eldono. *Retoriko* havis grandan influon tra la esperantomovado, kaj kredeble tre kontribuis al altigo de la nivelo de publika parolado en esperanto. Ĝi enhavas kelkajn informojn pri lingvistikaj teorioj, kiuj sendube eksdatiĝos post novaj esploroj, kiel eksdatiĝas ĉiaj tiaj fakaj teorioj; sed la libro konsistiĝas plejparte el bonega gvidlibro pri ĉiuj aspektoj de publika parolado,



kaj tiuj konsiloj neniam eksdatiĝos. Stile la libro estas tiel instrue klara, ke la klareco mem ofte havas estetikan ĉarmon. Ĝi estas forte rekomendinda, al iu ajn, kiu kapablas legi esperanton kaj deziras instrui, prelegi aŭ iamaniere paroli por publiko. Tre valoraj, ekzemple, estas la konsiloj de Lapenna pri la psikologio de la oratoro, ekzemple pri la natura kaj signifoplena "timotremo".

La verkoj de LL Zamenhof estas, kompreneble, ankoraŭ multe legataj kiel modeloj de esperanta stilo. Foje lia stilo nuntempe ŝajnas iom eksmoda, sed nekorekta ĝi ne povas esti. Tiuj, kiuj ne sentas intereson pri la historio de esperanto, ne multe deziras legi la verkojn de Zamenhof. Ne ĉiu esperantisto sentas la specialan pietaton, kiun multaj seriozaj esperantistoj ankoraŭ sentas pri Zamenhof; kaj pietaton oni povas nur senti, ne instrui. La legemulo tamen ne tro rapide decidu, ĉar Zamenhof verkis, originale, precipe pri esperanto mem kaj la frua esperantomovado, ke liaj verkoj estas malaktualaj. Pensigaj por ĉiuj restas, ekzemple, liaj verkoj (plej facile haveblaj en *Originala verkaro*) *Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia*; la siatempe tre kuraĝa, nuntempe tragike ironia, *Post la granda milito*; aŭ la dokumentoj pri hilelismo aŭ homaranismo. La leganto, kiu komencas sian studadon per tiaj verkoj, eble poste volos pli esplori la verkaron de homo elstare nobla kaj altruista, sed ankaŭ sendepende inteligenta kaj kun logika, disciplinita menso. Mi ofte ricevas ĝeneralan impreson pri similaĵoj inter la stilo de Zamenhof kaj la stilo de Lapenna; tion mi neniam detale analizis, sed mi kredas, ke temas grandparte pri la kristala klareco, la nekutima elektado de tiu lingva rimedo, kiu por esprimi la ideon estos la plej rekta kaj simpla, do la plej facila por la leganto.

La leganto, kiu ankoraŭ ne sentas intereson pri la verkoj de Zamenhof, almenaŭ legu *Vivo de Zamenhof de Privat*; ĝi ne estas longa. Nun ekzistas biografioj pli faktoplenaj, sed ĝi estas tre bela, sincera, poezia, baza biografio, kaj malgranda juvelo de la esperanta literaturo — kaj de la homa konscienco.

Kredeble ĉiu modere klera esperantisto prezentus propran liston de rekomendaĵoj el la multaj nefikciaj esperantaj verkoj; mi aldonos kelkajn aliajn rekomendojn miajn al la nefakulo: la belajn verkojn pri geologio de Leander Tell, *La bela subtera mondo kaj Estiĝo de la tero kaj de la homo*; kortuŝan kaj streĉan libron de Teodoro S. Ŝvarc, *Maskerado ĉirkaŭ la morto*, kiu vive kaj persone bildigas, kiel estis esti judo proskribita en nazi-okupita Hungarlando. Mirinde, tiu aŭtentika verko pri neforgesebla tragika epoko kaj korfrostigaj maljustaĵoj kaj persekutoj estas verko, kiu enhavas ne nur streĉitecon, sed multan humuron. Ĝi estas valora dokumento pri la kapabloj de la homo por malbono kaj ankaŭ pri la pli noblaj flankoj de la homa psiko.



Kaj *Enciklopedieto japana*, konsultlibro, estas por okcidentanoj konsultlibro tiel ekzotika, ĉarma, kaj tiel iasence bonveniga kaj helpema, ke ĝi certe donos plezuron al multaj legantoj.

Sed legemuloj konsultu ankaŭ librolistojn, ĉar neniu interesiĝas pri ĉio; sed esperanto jam proponas ion, se ne pri ĉio, certe pri multaj el la kulturaj, sciencaj, spiritaj kaj korpaj interesoj de la homaro.

## TRADUKOJ

Estas facile kredi kaj iasence estas eĉ vere, ke traduko estas verko iom duagrada. Certe ne povus ekzisti traduko, kiu pri ĉiu detalo perfekte redonus la intencon de la originala aŭtoro, kiu ĉiurilate samefikus kiel la originalo. Eĉ ĉe la plej brile trafa traduko la neevitebla granda malsameco de la sonoj jam kaŭzas grandajn

diferencojn. Sed traduko estas verko duagrada nur kompare kun tiu sama verko en la originala lingvo. Bona traduko el Dante estas ja pli valora ol tute originala verko de iu senkriteriama amatoreca versfaranto. Tradukado estas grava kultura arto. Iu ajn, eĉ poligloto, kiu deziras iom larĝe rigardi la panoramon de la mondliteraturo, devos multe fidi al tradukoj. Parenthese: mi renkontis anglojn, kiuj konfesis al mi, ke ili komprenas pli bone la bonajn esperantajn tradukojn el Ŝekspiro ol la anglajn originalojn, ĉar la nun tre arkaika angla lingvo de la deksesa jarcento kompreneble tradukiĝis en esperanton de la dudeka!

Ek de Zamenhof mem en la unua libro esperantistoj multe tradukadis, pro kelkaj gravaj motivoj.

Ili deziris pruvi, ke la lingvo estas adekvata por seriozaj literaturaj verkoj. Zamenhof tradukis romaneton de Dickens (bedaurinde unu el liaj plej nesignifaj, *La batalo de la vivo*), ĝuste ĉar iu asertis, ke estus neeble traduki tian verkon en esperanton. La respondo de Zamenhof estis la sola plene refuta respondo. Gravaj estas tiaj defioj kaj reagoj, ĉar se lingvo ne sufiĉas por traduki maturajn altnivelajn nacilingvajn literaturaĵojn, ĝi ja ne sufiĉas por esti plene funkcia literatura lingvo. Kredeble la ĉefa esceptaĵo estas, ke plej ofte oni ne povas perfekte traduki vortludojn de unu lingvo al alia. Sed tiuokaze bona tradukisto penos trovi ian pli-malpli ekvivalentan vortludon. Kaj se lingvo ne permesas vortludojn, ĝi do denove kredeble ne estas lingvo ĉiurilate adekvata por homaj bezonoj!

Esperantistoj ankaŭ komprenis, ke per tradukado ili pli esploros kaj grandigos la esprimrimedojn de sia lingvo. Tiu, kiu verkas originale, rajtas decidi, ke jen estas io, kion li ne diros, ĉar li ne disponas lingvajn rimedojn por ĝin diri. Neniu scios, ke li jam deziris diri ion alian. Sed tradukisto ne rajtas tiel forkuri de la problemoj; li devas alfronti ĝin kaj trovi la esprimrimedojn. La tuta strukturo de esperanto donas al ĝi kolosajn esprimrimedojn latentajn; restas ankaŭ la rajto proponi novajn radikojn en kazo de vera bezono. Grandaj artistoj, kiel ekzemple Kalocsay,



Auld kaj Waringhien, do pene kaj konsciencel elforĝis, tradukante, lingvon pli esprimoriĉan, fortan, koncizan, elegantan. Kaj lingvo plievoluinta estas poste la jama posedajo de ĉiuj verkistoj.

Preskaŭ ĉiuj esperantistoj estas pli-malpli internaciistoj kaj deziras plibonigi interkomprenon kaj toleremon inter la nacioj. Ankaŭ tio povas esti forta motivo ideologia por tradukado. Kun tiu internaciismo ofte miksiĝas la plej nobla speco de naciismo: la deziro montri al alinacianoj, kiel belaj estas la ĉefverkoj de nia landa kulturo. Traduki nacilingvan verkon, pri kiu oni fieras, estas samtempe pliigi la gloron de la propra nacio kaj fari belan donacon al alilandanoj. Traduki majstroverkon el la kulturo de alia lando, kiel faris ekzemple Kalocsay, estas ankaŭ nobla supernacieca altruismo.

Finfine, bonaj tradukoj havas ian specialan utilon: pedagogian valoron por lernado de lingvoj. Tiu, kiu ankoraŭ ne tre bone scipovas la lingvon, sed volas progresi, ofte povas multon lerni per studado de traduko el nacilingva verko, kiun li bone konas. Jam konante la enhavon, ne frontante plenan misteron, li povas vere rimarki diversajn esprimrimedojn kaj solvojn de problemoj, kaj tiel multe lernas pri la traduka lingvo.

Multaj, kiuj kun plezuro legas propran literaturon, sed tre sentas, ke traduko estas iom duagrada, ne konscias, ĝis kioma grado multaj el la originalaj verkoj, kiujn ili amas, estas tradukoj. La Biblio, kiu en diversaj naciaj lingvoj tre kontribuis al la lingvaj kutimoj, estas same traduka en la sveda, la norvega, la franca, la angla, la rusa, la germana, kiel en esperanto. Surprize multaj poemoj de la renesanco, en diversaj lingvoj, estas pli-malpli tradukoj el la latina aŭ la helena. Pluraj pioniraj anglaj sonetoj estas tradukoj el la itala. Faka esplorado pri nacia literaturo ofte malkovras uzadon de literaturaj fontoj, kiu almenaŭ proksimas al tradukado libera. Do, tradukado kaj adaptado ofte gravis en la maturiĝo de nacilingvaj literaturoj, kiel ili gravis en la maturiĝo de esperanto.

Esperanto tamen povas havi aparte riĉan kaj rapide evoluantan tradukan literaturon, ĉar

ekzistas esperantistoj en ĉiuj civilizaj landoj. Oni do rajtas atendi, ke pli-malpli frue aperos iu esperantisto, kiu kapablas verki artajn tradukojn el sia nacia literaturo. Jam ekzistas en esperanto tradukoj el la jenaj lingvoj: albana, angla (inkluzive kelkajn usonajn kaj angla-sudafrikajn verkojn), araba, armena, bengala, bulgara, ĉeĥa kaj slovaka, ĉerkesa, ĉina, dana, estona, finna, flandra, franca, frisa, germana, hebrea, helena, hispana (inkluzive verkojn el Meksikio, Urugvajo kaj Argentino), hungara, eble eta traduko el indiana lingvo (sed tiun verkon oni kredeble tradukis el angla versio), indonezia, islanda, itala, japana, jida, jugoslaviaj lingvoj (precipe kroata kaj slovena), kartvela, kataluna, kirgiza, laosa,

latina, latva, litova, nederlanda, norvega, persa, pola, portugala (inkluzive multajn verkojn el Brazilo), provenca, retoromanĉa, rumana, rusa, sanskrita, sveda, ukraina, uzbeka kaj vietnama. Jen do la perspektivo estas esence tutmonda.

Kompreneble ne ĉiuj tradukoj eĉ eldonitaj estas ĉefverkoj. Por traduki artverkon adekvate oni devas mem esti artisto, ne facile kontentiĝi, kaj esti vere sentema pri literaturaj kvalitoj. Ekzistas plorindaj fuŝaĵoj, sed ankaŭ ekzistas multaj esperantaj tradukoj rimarkinde bonaj kaj multaj, kiuj estas eĉ tiel senspirige trafaj, ke ili povas doni tiun senton pri ia malgranda miraklo, kiun oni foje sentas antaŭ vere inspirita kaj polurita artverko.

(daŭrigota)

## NYTT UR VÄRLDS-LITTERATUREN



LA ROBAJOJ  
DE OMAR KAJAM

(The Rubáiyát of Omar Khayyám)  
Tvåspråkig version, esperanto  
och engelska, av den mest  
kända persiska poetens vikti-  
gaste verk. Illustrerad, 50  
sidor. 44,- kr



PENDUMILAJ LIDOJ  
DE KRISTIANO MORGENSTERNO

Burleska dikter med ordlekar,  
fantasifullt översatta från  
tyska. 108 sidor. 39,- kr



DON JOHANO  
DE BAJRON

Den första av 17 sånger i  
ett av den engelska litte-  
raturens mest kända verk.  
Kommer fler i översättning?  
Det beror på intresset för  
den här boken. 70 sidor. 32,- kr

- Ständ din beställning till EsperantoCentro, Brönsgatan 21, 111 38 Stockholm.
- Sätt in vad böckerna kostar på postgiro 20 12 - 3, Esperantoförbundet, så slipper du fakturaavgift på 5,- kr.
- I priserna ingår moms och porto. (Reservation för ändring av valutakurser, moms med mera).

Esperantoförlaget



## Anledning till glädjerop

Varje gång det kommer ett inbetalningskort med anteckningen "Klubo Cent" hoppar Anita Lindblom, Esperantoförbundets kassör, till av glädje. Varje hundralapp, som medlemmarna i Klubo Cent skickar till Esperantoförbundet utöver sin ordinarie avgift, blir mer än välkommen. Man får tänka sig vilka skutt hon tar när inbetalningskortet innehåller högre summor, helst med fler nollor i slutet!

Ett sådant tillfälle till glädjehopp fick Anita häromdagen — och inte bara hon! — när det kom ett inbetalningskort från Agda Olsson från Angered, en upprepning av en lika stor gåva som förra hösten. Vid sådana tillfällen känns det lätt att vara kassör.

Men tillbaka till hundralapparna och Klubo Cent. Många är de som inte glömmer SEF, så vi har anledning att publicera ytterligare en lista på "medlemmar" i denna förnäma klubb. Låt den inte vara för exklusiv!

Sen sist har följande blivit "medlemmar" för 1981:

Rune Ekmark, Sandviken  
Erik Carlén, Kumla  
Henry Almar, Uddevalla  
Einar Nilsson, Herrljunga  
Herbert Rosendahl, Vänersborg  
Halmstads Esperantoklubb  
Milorad Ljubisavljević, Älta  
E. Nilsson, Malmberget  
Einar Noweni, Åstorp  
Sven Uno, Motala

## Sommarkurs i Kungälv

Kungälv's esperantoklubb hade sin sommarkurs, med 15 vuxna och 5 barn som deltagare, i Störshult den 4, 5 och 6 september. Ledare för de olika grupperna var Georg Kustosz från Danmark, som undervisade dem som kunde lite grand; Märtha Andréasson, som hade hand om nybörjarna; och Inga Johansson, som hade konversationsövningar med dem, som kunde lite mer. Marianne tog hand om barnen i en grupp.


Man hade poängpromenad, där Ingelis och Marianne bäst

# JESÖNE

kunde esperantonamnen på olika växter. Barnen hade speciella frågor. Sedan hade man lekar, trekamp och säcklöpning, och uppgift att leta upp föremål som började med bokstäverna e-s-p-e-r-a-n-t-o; helst skulle det vara esperantoord. Anneli kanske var originellast med att hitta en pissmyra för bokstaven p, de flesta andra hade hittat ett plommon eller *pruno*.

På fredagkvällen hade man korvgrillning och på lördagkvällen sill med färsk potatis och gräddfil. Senare på lördagkvällen fick man se en film från Grönland. Det var Georg, som hade den med sig. Han har varit på Grönland som lärare i tio år, så han kunde berätta mycket intressanta detaljer till filmen.

## Gemensamt i Linköping



Här kommer en notis som av okänd anledning blivit liggande i redaktörens låda för inkommande post alltför länge. Den säger att medlemmarna i esperantoklubbarna i Linköping, Norrköping och Motala hade den 16 maj återupplivat en gammal tradition att hålla ett gemensamt möte. Detta förlade man till Linköping och började med att göra en rundvandring i reservatet "Gamla Linköping", en stadsdel där äldre byggnader från stadens centrum flyttats ihop på ett

förnämligt sätt. Rundvandringen leddes av en sakkunnig guide. Bilden här intill är från denna rundvandring.

Efter besöket samlades de ca 50 deltagarna till samkväm.

## Hur många höstkurser?

Under hösten 1980 och våren 1981 kunde vi registrera ett mångdubbelt deltagande i esperantokurser på många håll. De hittills inkomna rapporterna tyder på att det ökande intresset för esperanto håller i sig, särskilt i skolorna, vilket är glädjande. *La Espero* vill gärna få så många snabba rapporter som möjligt om kursverksamheten i höst, helst från **alla klubbar**. Alla ni som leder kurser — hör av er!

## Konatiĝu kun estraro

Jam pasis longa tempo depost kiam *La Espero* informis pri la estraro de SEF. Atentaj legantoj trovis tiun informon en iu aŭ alia artikolo, sed kolektita informo mankis. Estas do taŭge doni tiun informon nun.

La estraranoj certe ĝojos, se vi turnos vin al ili kun demandoj kaj proponoj kaj — certe ne malplej



— kun sinanoncoj pri kunlabo-  
ro. Jen ili estas:

**Roland Lindblom**, *prezidanto*, Pl  
3086, 14800 Ösmo, tel. 0752-  
42143

**Märtha Andréasson**,  
*viceprezidanto*, 2265 Tolsered,  
42590 Hisings Kärä, tel. 031-  
571133

**Birger Viggén**, *sekretario*,  
Kvarnplan 1, 17541 Järfälla, tel.  
0758-31630

**Anita Lindblom**, *kasisto*, Pl 3086,  
14800 Ösmo, tel. 0752-42204

**Karin Strandberg**,  
Husmansvägen 19, 22238 Lund,  
tel. 046-114897

**Niklas Gustafsson**, *Hesselmansv.*  
63, 75263 Uppsala, tel. 018-462005

**Kerstin Rohdin**, Ålsta, 69072  
Sköllersta, tel. 019-160846

**Linnéa Edsenius**, *anstataŭanto*,  
Vilhelmsgatan 2, 38200 Nybro,  
tel. 0481-10744

**Åke Rohdin**, *anstataŭanto*, Ålsta,  
69072 Sköllersta, tel. 019-160846

## Ĝi aperos kiel libro

La serio de Marjorie Boulton pri  
la esperanta literaturo aperos en  
*La Espero* ĝis la fino de la jaro.  
Restas do ankoraŭ du partoj, kiuj  
aperos en numeroj 7 kaj 8. Iam  
komence de 1982 la sama teksto  
aperos ankaŭ kiel libro ĉe El-  
dona.

La verko estas mendita de  
Eldona ĉe la aŭtorino kaj ĝi  
aperos ankaŭ en la sveda lingvo  
en la serio *Faceto*.

# PERSONE

Amiko mia — fakte pli amiko de  
mia edzo — ne havas multan  
simpation al esperanto. Sed li  
estas ĉarma homo, junaĝa amiko  
de mia edzo, kaj ni daŭre  
renkontiĝas. Malgraŭ tio, ke ni  
jam dum kelkaj jardekoj okupi-  
ĝas pri esperanto, ne pasas  
okazo, sen ke li iel primoku nin  
pri tio. Kelkfoje povas esti tute  
hazarda:

—Ĉu vi venus kun mi al hokeo  
dimanĉe? Pardonu, mi forĝesis  
ke vi preferas multoblige iajn  
papirojn pri tiu via esperanto.

Aliajn fojojn li povas esti multe  
pli kruela. Sed tio preskaŭ fariĝis  
ludo inter ni, kaj ni neniam restas  
senrespondaj. Ŝajnas kelkfoje,  
ke ni konkuras inter ni pri la plej

kruela primoko. Ni tamen daŭre  
estas amikoj kaj ĝuas renkontiĝi.

Miru pri nia surpriziĝo, kiam  
alvenis perpoŝte listo de parto-  
prenantoj al la ĉiaŭtuna kurso de  
mia edzo. Ĝi estis agrable longa,  
kio indikas, ke la interesiĝo pri  
esperanto plu kreskas. Inter ĉiuj  
nomoj estis ankaŭ tiu de Y, la  
edzino de nia amiko, la malami-  
ko de esperanto!

—Ili divorcis! estis mia unua  
penso. Sed ne: ŝia adreso estis  
daŭre la sama, kaj ke li ne  
transloĝiĝis, tion ni sciis.

—Ŝi intencas divorci de li kaj  
kolektas kaŭzojn por montri,  
kiel kruela li estas. Kaj mi jam  
vidis la grandajn titolojn en la  
vesperaj gazetoj: "Edzo malper-  
mesas esperanto-kurson. La ed-  
zino divorcas."

—Li sendis ŝin al esperanto-  
kurso por kolekti pliajn argu-  
mentojn kontraŭ ni, estis la  
teorio de mia edzo. Sed mi scias,  
ke ŝi neniam farus ion similan,  
ĉar ŝi estas tro memstara. Krome  
ŝi neniam ŝatis liajn rikanaĵojn  
kontraŭ ni.

Okazis, ke mi *devis* partopreni  
la unuan lecionon; mi estis tro  
kurioza por atendi neplanitan  
okazon por paroli kun ŝi. Mi  
sidiĝis en lernejan benkon kaj  
sekvis la tutan lecionon. Y sidiĝis  
iom for de mi, ĉar la seĝon tuj  
apud mi iu alia okupis antaŭ ŝia  
alveno. Kaj post la leciono mi tuj  
kaptis ŝin kaj nur sukcesis dem-  
andi: —Kial?

Ĉi ekridegis kaj respondis, ke  
ĝuste tiun demandon ŝi atendis  
de mi. Kaj poste ŝi aldonis:

—Mi neniam opiniis, ke via  
interesiĝo pri esperanto estas io  
negativa. Kontraŭe; sed nur nun,  
kiam miaj filoj ne plu bezonas  
tiom da mia atento, mi havas la  
tempon por kelkaj studoj. Kaj  
kial ne esperanto?

—Sed via edzo ...

—Kion li opinias, tute ne tuŝas  
min. Cetere, ne tro surpriziĝu, se  
vi iun jaron trovos lian nomon  
inter la aliĝintoj al esperantokur-  
so.

Tia estas la vivo. Ni certe trovos  
manieron amuziĝi ankaŭ sen liaj  
rikanaĵoj.

Ĉaŭ!



## LA VIRO EN LA MORTOTUKO

I översättning av biskop Sven Danells bok "Man-  
nen i svepeduken" kr 25,—

En oerhört intressant bok, som inte bara beskriver  
de fakta, som talar för svepedukens äkthet, utan  
som också i detalj klargör omständigheterna kring  
Jesu lidande och korsfästelse.

Förmedlar även annan litteratur och grammofoonklivor. Begär  
prospekt!

FÖRLAG GRÖNA STJÄRNAN  
Landerigatan 7, 416 70 Göteborg  
Tel 031 - 19 37 90 • Postgiro 8 84 51 - 0

Eta Mi





## Explosion snart i Kina

I slutet av juli samlades 300 esperantotalande i Huangshi, i en av de första större officiella arrangemangen i Kina efter omorganisationen av det kinesiska esperantoförbundet 1978. Representanter kom från 26 av de 30 kinesiska provinserna. Programmet innehöll olika föredrag, möten, en organisatorisk konferens mm.

Intresset för esperanto växer explosionsartat, vilket innebär vissa problem, bland annat på lärarsidan. Man har delvis löst detta genom två korrespondenskurser. En av dessa, Xinhua, hade 29 466 elever läsande esperanto i mars i år, utvalda bland 150 000 anmälda.

Olika frågor diskuterades på den organisatoriska konferensen, t ex möjligheten att bilda olika fackförbund: för vetenskapsmän, lärare och ungdomar.

## Familjeträff i Zilina

Familjer, där esperanto används som familjespråk, har fått sina egna träffar. För tredje gången anordnades en sådan träff i somras, denna gång i Zilina, Tjeckoslovakien. En viktig del av träffen var att umgås och utbyta erfarenheter, men olika föredrag fanns med på programmet: om syntaxutvecklingen hos tvåspråkiga barn, betoningen i esperanto, av-undervisning o liknande. Nästa år kommer en likande träff att äga rum i Ungern.

## Esperanto i museibok

Esperanto kommer att vara ett av de språk i vilka facktermer om museer kommer att finnas tillgängliga i ett stort internationellt lexikon. *Dictionarium museolo-*

*gicum*, som verket kommer att heta, är ett projekt som Internationella Museirådet, som samarbetar med Unesco, satte igång 1977. Verket kommer att finnas färdigt 1983. En provisorisk esperantodel, underlag för diskussion bland fackmän, kommer att finnas vid slutet av året.

## Firar 60-års jubileum

SAT, Sennacieca Asocio Tutmonda, den internationella organisationen för arbetar-esperantister, hade sin 54:e kongress i Basel (Schweiz) i år, med 300 deltagare. Vid denna kongress firade organisationen sitt 60-årsjubileum.

## Kandidat till litteraturpris

Den kinesiske författaren Ba Jin var även i år en av kandidaterna till Nobels litteraturpris.

Ba Jin är en av de största namnen i den nutida kinesiska litteraturen och ordförande i författarförbundet. Han är också vice-ordförande i kinesiska esperantoförbundet.

Hans intresse för esperanto dateras till hans unga år, då han t o m översatte flera esperantoböcker till kinesiska. 1980 besökte han Stockholm som ledare för den kinesiska delegationen till den internationella esperantokongressen. På esperanto finns hans korta roman *Aŭtuno en la printempo* (Höst på våren).

## KORT & GOTT

USA. Veckan 12—18 juni blev i New York av borgmästaren Edward Koch utnämnd till "Internationella vänskapens esperantovecka" [International Friendship Esperanto Week], eftersom USAs esperantoförbund valt att just denna vecka kongressa i New York.

VÄSTTYSKLAND. 11 till 18 november kommer tre olika konferenser att äga rum i Paderborn, alla på esperanto. Konferenserna behandlar ämnen som "Interlingvistik i utbildningen och vetenskapen" och "Språkproblemet inom vetenskaperna". Konferenserna organiseras av Institut für Kybernetik i Paderborn.

NORGE. Det norska utrikesdepartementet har börjat ge ut olika skrifter på esperanto. "Samerna i Norge och deras historia" är titeln på den senaste.

SVERIGE. I december kommer Uppsala Esperantoförening att fira 90 år och är troligen den äldsta fortfarande verksamma

föreningen i världen. Redan i slutet av 1800-talet spelade föreningen en viktig roll i esperantorörelsen, som utgivare av tidningen *Lingvo Internacia*, dåtidens internationella organ.

MEXIKO. TEJO, de unga esperantisternas internationella förbund har haft sin kongress i Oaxtepec. Det är första gången denna organisation kongressar utanför Europa, i ett land där esperantoorganisationen fortfarande är i bildande.

BELGIEN! Nästa års internationella esperantokongress kommer att äga rum i Antwerpen. I samma stad finns Internationella esperantoförbundets grafiska centrum.

SRI LANKA. Sri Lankas motsvarighet till vår organisation "Rädda barnen" har gett ut en broschyr på esperanto, där de uppmanar alla länders människor att arbeta för barnens bästa och avstå från militära rustningar.